ANTAŬEN
suplemento de Informilo
2/22 JUNIO 2014

❖❖❖

nejo Baiyangshujie de la urbo Taiyuan, per siaj amoplena voĉo kaj vigla stilo profunde impresis la partoprenantojn. Estas menciinde, ke en sia leciono ŝi ne nur lernigis al la infanoj la lingvon Esperanto, sed ankaŭ atentigis ilin amikiĝi kun bestoj kaj protekti la naturon. Michel, ĉina bofilo el Francio, donis tre interesan lecionon. Lia humura instruarto alportis al la leciono multajn ĝojon kaj ridojn. Li eĉ invitis la gepatrojn de la lernantoj partopreni en lia lernigado kaj per tio en ĝojo kaj rido la lernantoj ekposedis la lingvon. Ankaŭ Chen Ye, instruistino de la Elementa Lernejo Dongfang, kaj Xie Xiaojuan de la Elementa Lernejo Yongtai donis publikajn lecionojn.

Danke al la platformo la instruistoj lernigis la infanojn kaj lernis de siaj samprofesianoj. Fakte estis la unua fojo por ĈLEI aldoni al la seminario publikajn lecionojn, kiuj vekis tre pozitivan eĥon inter la ĉeestantoj.

Ankaŭ la lernejestroj de la kvar supremenciitaj lernejoj okaze de la seminario prezentis siajn planojn kaj sperton de E-lernigado. Inter ili la Elementa Lernejo Dongfang havas 30-jaran historion pri Esperanta instruado. Jam en 1984 la lernejo fondis E-grupon kaj komencis la lernigadon de la lingvo kaj per Esperanto la lernejo ĝemeliĝis kun la japana elementa lernejo Yosumi de Takatsuki.

Nuntempe la lernejo prenis Esperanton kiel devigan studobjekton por siaj lernantoj de la 4-a, 5-a kaj 6-a klasoj, por kiuj Esperanto malfermis fenestron al tute malsama mondo. Same kiel ĝi ankaŭ la elementaj lernejoj Baiyangshujie kaj Yongtai enlistigis Esperanton en siajn devigajn studobjektojn. Pri tio s-ro Wei Yubin, estro de la lernejo, diris, ke en lia lernejo la lernantoj kun sperto de E-lernado pli bone posedas la anglan lingvon ol tiuj, kiuj ne havas sperton de lernado de Esperanto. Krome ĝi alportis al la lernejo pli malferman kaj internacian etoson. En 2010 ĝi sukcese gastigis la 2-an Ĉinan E-seminarion, kaj per interesaj programoj kaj prelegoj allogis al si pli ol 60 e-istojn. En la seminario ankaŭ la estroj de la elementaj lernejo

Baotalu de la urbo Zhenjiang kaj Yongtai en Pekino prezentis E-lernigadon en siaj lernejoj. En la dua tago 7 instruistoj prelegis pri la temo de E-instruado. Ili ĉiuj havas riĉan sperton en E-lernigado kaj resumis la efikajn metodojn pri lernigado de la lingvo.
Michael emfazis en sia prelego, ke la lernantoj estas la centro en la E-lernigado, kaj la instruistoj devas enmeti kredon en siajn okulojn por kuraĝigi la lernantojn en la lernado. Fakte li estas spertoplena instruisto ne nur en lernigado de Esperanto sed ankaŭ en instruado de aliaj kulturaj lecionoj.

Ho Song el Koreio laboranta en la Profesia Teknika Kolegio en Changzhou, Ĉinio, prelegis pri sia sperto en la E-instruado. En sia bone preparita prelego li eĉ resumis erarojn ofte faritajn de ĉinoj dum ilia lernado de la lingvo Esperanto kaj per tio li atentigis ankaŭ la ĉeestantojn pri la facile fareblaj eraroj.

Jano loĝas en Ĉinio dek kvin jarojn, kaj en lastaj jaroj kiel instruisto li gvidis kursojn en la Esperanta Insulo Hajnano kaj akumulis por si multan sperton pri E-lernigado. Li esperas starigi seriozan projekton por instrui azianojn kaj deziras, ke en E-renkontiĝoj la lernantoj multe praktiku por altigi lingvonivelon.

La instruisto Trezoro per humura rakonto donis al la kunveno leĝeran etoson. Li multfoje emfazis la efikon de kuraĝigado al la lernantoj. Laŭ li tio estas helpa por malfermi la buŝon de la lernantoj paroli la lingvon. Li volas per organizado de E-aktivadoj trejni ĉinajn aktivulojn kaj okaze de la seminario li prezentis la preparan laboron de la Orienta Esperanto-Seminario, kiu okazos inter la 16-a kaj 23-a de aŭgusto en Xi'an. En la kunveno prelegis ankaŭ Wei Yubing, Gao Youming, Zhang Changsheng. Ne nur la prelegantoj, sed ankaŭ la ĉeestantoj multe rikoltis en la diskutoj. En la lastaj jaroj la seminario kiel sperto-interŝanĝa platformo konstruis ponton por la ĉinaj instruistoj, kaj helpis ilin

en la lernigado de Esperanto. Estas atendeble, ke dank' al iliaj klopodoj kaj diligenta laboro estiĝos pli da e-istoj, kiuj elkore amas la lingvon.

Laŭ peto de la redakcio El popola Ĉinio

Prezentado de E-hundino

La 9-an de majo 2014 mi estis invitita kun mia hundino Kati en la domon de geolduloj en la urbon Česká Třebová. Tie la sociaj laborantinoj bone zorgas pri distraĵoj de siaj loĝantoj, ĉiusemajne preparas por ili diversajn programojn. Sur la afiŝo mi legis: Kultura surprizo kiel donaceto por la patrinfesto. Kaj mi jam vidis la unuajn spektantojn eniri la salonon. Mi preparis la rekvizitojn kaj frandaĵojn (premioj por Kati) kaj ĝi dume kontrolis la spektantaron.

Nian prezentadon mi komencis per rakontado – pli precize dirite informo pri Esperanto, kiu helpas akiri geamikojn en la tuta mondo kaj estas kelkoble pli facila ol kiu ajn nacia lingvo. Iomete el tio jam komprenas eĉ Kati kaj mi utiligas ĝin kiel "instruistinon de Esperanto" por infanoj. Ili ordonas al Kati Esperante kaj Kati aŭskultas ilin. Je la ĉeĥaj ordonoj Kati ne reagas.

Kaj la spektantaro aŭdas ĉeĥe kaj Esperante: sidu, kuŝu, dancu, tiru vagonon, saltu, kalkulu, serĉu, rulu barelon. La plej gravan intereson pri gimnastiko kun Kati havas la svelta knabino Renata. Ŝi tenas ŝnuron, ke la hundino povu saltadi, Kati portas al ŝi koverton, serĉas ĉe ŝi kaŝitan ŝlosilujon kaj tiras al ŝi vagoneton. La samon deziras aliaj homoj kaŝi ŝlosilujon kaj ĉefe doni al Kati matematikajn taskojn: adiciadon, subtrahadon, dividadon kaj multiplikadon. Mi devas diri ilin al Kati Esperante. Ĝi estas lerta, eĉ ne unufoje ĝi eraris. La rezultojn ĝi ĉiam ĝuste bojis. Nur trompis min – kiel kutime - ĉe transdono de la naztuko, kiam mi ternis. Kati faris el ĝi kelkajn pecetojn kaj alportis al mi nur parton. Tamen poste tiun uzitan peceton ĝi forportis en paperkorbon.

La "kultura surprizo" daŭris proksimume unu horon kaj mi ĝojis, ke la homoj bone amuzis sin.

Zdenka Novotná, elĉeĥigis J. Rýznarová